

Novembro - decembro
Novembre - décembre-
2007

Esperanto la verda stelo



ASSOCIATION
ESPERANTISTE
Dumonata revueto
numero 46

FETES DES ASSOCIATIONS

Lors des fêtes des associations, dans les salons, nous avons la possibilité de présenter l'espéranto aux visiteurs. C'est ce qui s'est produit dernièrement à Choisy-le-Roi, Champigny... De nombreuses personnes ont ainsi pu recevoir des informations et de la documentation.

Il est important que chacun dans son secteur soit attentif et utilise ces possibilités de propagande. Nous contacter pour obtenir du matériel -voire les conseils- de ceux ayant l'expérience de ces actions.

KALENDARO

Samedi 1er décembre
14h-16 h babilrondo
16h-18 h laborkunveno
Tour Picasso à Choisy

Fête du livre... Dimanche
4 février 2008 : JP
Ducloyer pour l'Espéranto
Salle "Le Royal" à
Choisy

*Nous prévoyons
l'Assemblée Générale :
samedi 15 mars 2008
Nous confirmerons cette
date dans notre prochain
bulletin*



TABLE DES MATIERES		TEMARO	
p. 2	Table des matières / Petites annonces	p. 2	Temaro / Anoncetoj
p. 3	Visiter Strasbourg en Espéranto	p. 3	Viziti Strasburgon Esperante
p. 4	Archives d'Espéranto à Vienne	p. 4	Esperantaĵoj arkivitaj en Vieno
p. 5	Une étude bienvenue ; Soutien à l'Espéranto	p. 5	Bonvena studaĵo ; Subteno al esperanto
p. 6	Trois questions à Alain Blavat	p. 6	Tri demandoj al Alain Blavat
p. 7	Esperanto, calendriers des événements	p. 7	Esperanto, kalendaroj de la eventoj
p. 8	Grâce à l'Espéranto, le football chinois s'ouvre au monde	p. 8	Dank'al esperanto, la ĉina futbalo malfermiĝas je la mondo
Imprimerie Spéciale			
Poŝtadreso : LA VERDA STELO – ESPERANTO 94 3 Rue Pablo Picasso Appartement 507 94600 Choisy le Roi Francio / France		Direktoro : Sébastien CARREZ (01.43.78.55.19) Courriel : esperanto94@laposte.net Redaktorino : Tereza (01.45.76.10.57) Korektanto : Claude GICQUEL Sendanto : Oktavio	

La Anoncetoj

La Libroservo de SAT-Amikaro, jam de longe kaj modele prizorgata de Bernard Schneider, estas de nun atingebla per retmesaĝo pro iom post ioma transpreno de tiu funkcio fare de Véronique Girard kaj Vito Markov :

satamikarolibroservo@laposte.net .

Ni subtenu ilin kaj kuraĝigu ilin, ambaŭ junaj, por ke ili povu ankoraŭ plialtigi la jam bonan kvaliton de niaj eldonoj kaj servoj :

Sat-Amikaro libroservo/ Service librairie de SAT-Amikaro
 Adreso / Adresse : 132-134, bd Vincent Auriol, FR-75013 Paris 13ème.
 FRANCIO / FRANCE - t. 01 44 24 50 48 - f. 01 44 24 50 02

Libroservo kaj katalogo ĉe /

Service librairie et catalogue sur : <http://www.esperanto-sat.info/rubrique29.html>

Sidejaj malfermhoroj che /

Heures d'ouvertures du siège sur : <http://www.esperanto-sat.info/article776.html>

SAT-Amikaro

Le service de librairie de SATamikaro, tenu jusque-là par Bernard Schneider, est maintenant confié à deux jeunes espérantistes, Véronique Girard kaj Vito Markov ; de plus, il est possible de commander et de recevoir des informations par internet aux adresses indiquées ci-dessus.

ESPERANTO 94 – LA VERDA STELO

SACHEZ QUE NOTRE SERVICE DE LIBRAIRIE À CHOISY-LE-ROI EST A MÊME DE VOUS FOURNIR LES LIVRES DONT VOUS AVEZ BESOIN

VISITER STRABOURG EN ESPERANTO

500 000 voyageurs, chaque année, prennent le bateau du port libre de Strasbourg. Pour utiliser l'espéranto, nous avons proposé de traduire en espéranto la promenade à travers le centre ville et le quartier de l'Europe. Ce qui nous fût accordé.

Après adaptation au public international et traduction, aidés de Catherine Roux et Ginette Martin, les membres du club de Strasbourg en ont fait l'enregistrement. Puis ils ont contrôlé la longueur des séquences et grâce à la version chinoise, qui est souvent assez longue, ils ont eu le temps de s'exprimer clairement.

Actuellement; l'espéranto est utilisé sur les bateaux couverts : " Nuée bleue ", " Belle Strasbourgeoise ", " Rouget de l'Isle " et " Petite France ". L'an prochain, le dernier bateau couvert " Gustave Doré " et les bateaux découverts en seront pourvus après adaptation de leur sonorisation.

L'Espéranto est la 10e langue utilisable pendant la visite. Avant le départ, le capitaine annonce les langues par haut-parleur. Chacun entend la phrase en espéranto : « Pour écouter le guide dans la langue internationale Espéranto, choisissez le numéro 10 ».

Si vous n'avez pas le temps de prendre le bateau ou n'aimez pas ce système pour découvrir la ville, vous pouvez charger le dossier et l'écouter sur votre mp3 . à : <http://www.esperanto-strasbourg.net> ou : <http://benecyril.free.fr> .

D'autres dossiers seront ajoutés concernant la cathédrale et les places Kléber et Gutenberg..

Il est envisagé d'inaugurer cette nouvelle formule, en faisant venir des personnalités du parlement européen et de filmer le discours inaugural, d'y ajouter des images de la ville et de le distribuer gratuitement aux télévisions européennes qui voudront bien présenter l'événement..

Selon informations de Cyrille Hurstel d' Esperanto-Strasbourg



VIZITU STRASBURGON ESPERANTO

500 000 vojaĝantoj eniras la boatojn de la Strasburga Sendependa Haveno ĉiujare. Pro tio, kaj celante utiligi Esperanton, ni proponis traduki la promenadon tra la urbocentro kaj la Eŭropa kvartalo al Esperanto. Tio estis akceptita..

Post adaptiĝo al la internacia publiko kaj traduko, helpitaj de Catherine Roux kaj Ginette Martin, la strasburgaj klubanoj surbendigis ĝin. Ili fine kontrolis longecon de ĉiu sekvenco, kaj dank'al la ĉina versio kiu estas ofte longa, ili havis sufiĉe da tempo por paroli klare.

Nuntempe, Esperanto aŭskulteblas ĉe tegmentaj boatoj " Nuée bleue ", " Belle Strasbourgeoise ", " Rouget de l'Isle " kaj " Petite France ". Venontjare, la lasta tegmenta boato " Gustave Doré ", kaj la sentegmentaj boatoj ricevos ĝin post adaptiĝo de sia sonsistemo.

Esperanto nun fariĝas la deka lingvo aŭskultebla dum la vizito. Antaŭ ĉiu ekiro, la ŝipestro anoncas ĉiujn dek lingvojn per laŭtparolilo. Ĉiuj ĉeestantoj aŭdos la frazon " Por aŭskulti la ĉiĉeronadon per la internacia lingvo Esperanto, elektu numeron 10 ".

Ĉar eble vi ne havos tempon enŝipiĝi, aŭ vi ne ŝatas tiun rimedon por malkovri la urbon, vi povas elŝuti la sondosierojn kaj aŭskulti ilin per via mp3-ilo. Vizitu aŭ <http://www.esperanto-strasbourg.net> aŭ <http://benecyril.free.fr> .

Klubanoj aldonos poste aliajn dosierojn, kiuj rilatas al la katedralo kaj placoj Kleber kaj Gutenberg.

La plano estas nun organizi inaŭguron de tiu nova uzebleco de Esperanto, venigante gravulojn kiel Eŭropajn Parlamentanojn. Ili planas filmi inaŭguran paroladon, aldoni bildojn de la urbo, kaj disvastigi ilin senpage al ĉiuj televidkanaloj en Eŭropo kiuj volos raporti pri la evento.

Laŭ informoj de Cyrille Hurstel el Esperanto-Strasbourg



ARCHIVES D'ESPERANTO A VIENNE

Le musée de l'Espéranto et des langues planifiées de la bibliothèque nationale autrichienne a lancé une collaboration avec « Imag-archive d'Autriche » et commencé à recenser et scanner ses 30 000 photos et 10 000 autres objets sur l'espéranto. La millième photo vient d'y entrer, les autres suivront bientôt. Dès à présent ces documents peuvent être atteints et consultés sur le Net. Au cours des années suivantes seront traités toutes les photos et autres objets du musée de l'Espéranto : dessins, peintures, affiches, cartes postales et illustrées, timbres-poste, insignes, étoiles, enseignes avec mention sur l'espéranto.

Ainsi les plus grandes archives mondiales d'images et objets sur l'espéranto sont à la disposition de tous. On peut charger les documents sans frais aucuns pour une qualité moyenne, avec supplément modique pour une qualité supérieure. C'est une bonne offre pour les diverses revues qui cherchent des images, aussi pour les scientifiques, collectionneurs ou espérantistes.

La langue écrite de « Imag-archive d'Autriche » est l'allemand. On peut chercher avec le mot « Esperanto » et ajouter par exemple « Wien » : on reçoit alors des images sur les événements espérantistes à Vienne. On peut aussi ajouter le mot « universala » pour atteindre toutes les photos des congrès universels. « Imag-archive d'Autriche » organise aussi de petites expositions virtuelles. Vient d'être enregistré la première : **“Esperanto zwischen 1918 und 1938”** (l'espéranto entre 1918 et 1938) avec bien sûr un développement sur l'Autriche. Comme « Imag-archive d'Autriche » est l'une des plus grandes banques « data » en Europe, ces expositions seront une propagande efficace pour l'espéranto

Appel aux espérantistes : Une garantie pour que vos photos sur l'Espéranto ne se perdent ! Envoyez-les au musée de l'Espéranto, qui les traitera avec soin et les conservera pour les générations futures.

voir ci-contre les adresses utiles ----->



4e congrès enfants en 1959 à Warscha

ESPERANTAĴOJ ARKIVITAJ EN VIENO

La Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko lanĉis kunlaboron kun la „Bildarchiv Austria“ kaj komencis inventari kaj skani siajn 30.000 fotojn kaj 10.000 aliajn objektojn kun Esperanta temo. Ĝus eniris la mila foto, la unuaj objektoj baldaŭ sekvos . Ekde nun tiuj dokumentoj povas esti alireblaj kaj konsultitaj en interreto. Dum la sekvantaj jaroj ĉiuj fotoj kaj aliaj objektoj de la Esperantomuzeo estos traktataj : desegnoj, pentraĵoj, afiŝoj, poŝtkartoj, bildkartoj, poŝtmarkoj, insignoj, steloj, ŝildoj mensiantaj pri Esperanta...

Tiel la mondscale plej granda arkivo kun Esperanto-bildoj kaj -objektoj estas je la dispono de ĉiuj. Eblas deŝuti la skanaĵojn – tute senkoste en meza kvalito kaj kun ioma krompago en altega kvalito. Estas granda oferto por la diversaj Esperanto-revuoj, kiuj serĉas historiajn bildojn, sed ankaŭ por sciencistoj, kolektantoj kaj la simpla samideano.

La priskriba lingvo de la “Bildarchiv Austria” estas la germana. Eblas serĉi per la vorto “Esperanto” kaj aldona vorto: Ekz. “Wien” vi ricevas bildojn de Esperanto-okazaĵoj en Vieno. Ankaŭ eblas aldoni la vorton “universala” por atingi ĉiujn fotojn de la Universalaj Kongresoj.

“Bildarchiv Austria” organizas ankaŭ malgrandajn virtualajn ekspoziciojn. Ĝus enretiĝis la unua: **“Esperanto zwischen 1918 und 1938”** (Esperanto inter 1918 kaj 1938) kun kompreneble emfazo de Aŭstrio. Pro la fakto ke “Bildarchiv Austria” estas unu el la plej grandaj bild-daten-bankoj en Eŭropo, tiuj ekspozicioj pri Esperanto havos ankaŭ tre gravan varban efikon.

Alvoko al Gesamideanoj : garantiu, ke viaj historiaj Esperanto-fotoj kaj dokumentoj ne perdiĝu! Sendu ilin al la Esperantomuzeo, kiu dece kaj konvene konservos ilin por futuraj generacioj.

Jen la adreso:

Esperantomuzeo, Nationalbibliothek
Postfach 308 A-1015 WIEN / Vieno

La retadreso de “Bildarchiv Austria”:

<http://www.bildarchivaustria.at/default.aspx>

La retadreso de la Esperantomuzeo:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>

UNE ÉTUDE BIENVENUE

“Une langue naturelle, démocratique, mondiale, c’est ce qu’il faut à l’Europe...”. Ainsi s’intitule la dernière brochure publiée par André Cherpillod (façon de parler, car l’auteur nous a habitués à attendre la suivante !).

C'est une étude détaillée divisée en 5 chapitres :

1. Un universitaire pose le problème (qui traite des principaux points du Rapport Grin).
2. L’espéranto : une langue naturelle.
3. L’espéranto : une langue démocratique.
4. L’espéranto : une langue mondiale.
5. L’espéranto aujourd’hui.

Cette brochure de **76 pages A5** a le mérite de réunir, sous une forme très condensée, la plupart des arguments en faveur de l’espéranto que l’on a pu lire çà et là, y compris dans le supplément d’informations en français “Service de Presse” de SAT-amikaro. Elle aidera beaucoup les personnes qui veulent en savoir plus sur cette langue et sa raison d’être aujourd’hui, et qui peuvent être amenées à répliquer aux arguments, y compris ministériels, opposés à cette langue. On y trouve aussi des comparaisons intéressantes et utiles avec d’autres langues telles que le japonais, le chinois, l’indonésien, le malais, le tibétain, l’hébreu, etc., car certains accusent l’espéranto d’être “trop européen” : ça ne les gêne pas que l’anglais, autrement plus compliqué et inéquitable, le soit !.

Prix : **4,50 €**, Éditions de la Blanchetière, S-ro André Cherpillod, La Blanchetière, FR-72320 Courgenard;

tél. + fax : 02 43 71 41 65

acherpillod@laposte.net

SOUTIEN A L'ESPERANTO

A l'occasion de son départ en retraite, nous tenons à saluer Madame Hélène LUC, sénatrice pendant de nombreuses années, et qui a présenté plusieurs projets de lois pour l'enseignement de l'Espéranto à l'école. Elle a toujours apporté un soutien actif et sympathique à notre action pour l'ESPERANTO à Choisy, dans le département et la région.

BONVENA STUDAĴO

« **Lingvo Natura, demokrata, monda, jen kion bezonas Eŭropo...** » Tiel titoliĝas la lasta broŝuro eldonita de André Cherpillod (se ni povas tiel esprimiĝi, ĉar la aŭtoro kutimigis nin atendi la sekvantan !).

Temas pri detala studaĵo dividita en 5 ĉapitroj.

1. Universitatulo situigas la problemon (kiu pritraktas la ĉefajn punktojn de la raporto Grin).
2. Esperanto : natura lingvo.
3. Esperanto : demokrata lingvo.
4. Esperanto : monda lingvo
5. Esperanto nuntempe.


Tiu broŝuro enhavas **76 paĝojn A5**, kies kvalito estas grupigi, sub tre kondensa formo, plejparton de la argumentoj favorantaj esperanton, kiujn oni povis legi en « Service de Presse » de SATamikaro. Ĝi multe helpos personojn, kiuj volas pli informiĝi pri tiu lingvo kaj ĝia neceso hodiaŭ, kaj kiu okaze povas respondi kontraŭajn argumentojn, eĉ ministeriajn. Ankaŭ troveblas interesaj kaj utilaj komparoj kun aliaj lingvoj kiel japana, ĉina, indonezia, malezia, tibeta, hebrea, etc., ĉar certaj akuzas esperanton esti « tro eŭropeca » : tio ne ĝenas ilin ke la angla, multe pli komplika kaj maljusta, tiel estas !



SUBTENO AL ESPERANTO

Okaze de ŝia emeritiĝo, ni deziras saluti S^{inon} Hélène LUC, senatanino dum multnombraj jaroj, kiu proponis plurajn leĝoprojektojn favore al instruado de esperanto en la lernejoj. Ŝi ĉiam aktive kaj simpatie subtenis nian agadon por ESPERANTO en Choisy, la departemento kaj la regiono.

TROIS QUESTIONS À ALAIN BLAVAT	TRI DEMANDOJ AL ALAIN BLAVAT
<p>Vice-président du Conseil général du Val de Marne (VdM) en charge de l'environnement, des espaces verts et de la protection contre les nuisances.</p>	<p>Vicprezidanto de la Ĝenerala de la Val de Marne (VdM) Konsilio, pri la vivkondiĉoj, verdaj spacoj kaj protektado kontraŭ la domaĝoj</p>
<p><i>D - Peut on dire qu'il y a plus d'espaces verts aujourd'hui qu'il y a 40 ans, sur le Val de marne ?</i> R - Lors de la création du Département en 1967, le Conseil Général a hérité de 37 hectares d'espaces verts.</p>	<p><i>D - Ĉu eblas diri, ke estas pli da verdaj spacoj, hodiaŭ ol antaŭ 40 jaroj en la VdM ?</i> R - Dum la kreado de VdM en 1967^a, la Ĝenerala Konsilio de la departemento heredis 37 hektarojn da verdaj spacoj.</p>
<p>Dix ans après, il affiche une politique volontariste en leur faveur. En témoignent les 22 parcs sur 219 hectares, autant de poumons verts où il est bon de se promener.</p>	<p>Post 10 jaroj, ĝi firme asertas favoran politikon pri tio. Tion atestas la 22 parkoj sur la 219 hektaroj, verdaj pulmoj, kie estas bone promeni.</p>
<p>Ces 2 dernières années, de nouvelles tranches de parcs ont été ouvertes au public : Villejuif, Ivry, Villeneuve St Georges, Arcueil...</p>	<p>Tiujn du lastajn jarojn, novaj parkeroj malfermiĝis al la publiko : Villejuif, Ivry, Villeneuve St Georges, Arcueil...</p>
<p><i>D - Quelles sont les compétences humaines affectées à la gestion des 219 hectares?</i> R - Le service public des parcs et des espaces naturels compte 217 personnes affectées à cette gestion. Paysagistes, urbanistes, écologues, horticulteurs, arboriculteurs... De nombreuses professions sont représentées. Chaque agent départemental veille à la bonne santé de notre patrimoine vert.</p>	<p><i>D - Kiom da homaj kompetencoj zorgas pri la administrado de la 219 hektaroj ?</i> R - La publikan servon de la parkoj kaj naturaj spacoj zorgas 217 personoj : urbanistoj, ekologiistoj, floristoj, arboristoj... Multe da profesioj estas reprezentataj. Ĉiu departementa oficisto prigardas la bonan staton de nia verda heredaĵo.</p>
<p><i>D - Et le développement durable ?</i> R - Depuis plusieurs années, nous mettons en place une conception dynamique et innovante du développement durable. C'est un des objectifs du Plan Vert départemental 2005/2015. Nous voulons optimiser les pratiques d'un point de vue économique tout en préservant l'environnement et en y intégrant les usages et les attentes de la population.</p>	<p><i>D - kion pri daŭrebla ekonomio?</i> R - De pluraj jaroj, ni enoficigis dinamikan kaj kreivan konceptadon de la daŭrebla ekonomio. Estas unu el la celoj de la departementa Verda Projekto 2005-2015. Ni volas plibonigi la praktikojn, vidpunkte ekonomikaj, samtempe antaŭsavantaj la vivkondiĉojn, kaj enmetante la kutimojn kaj la dezirojn de la departementanoj.</p>
<p>Le VdM comporte des richesses naturelles avec une biodiversité très intéressante, et compte des collections de végétaux qui participent pleinement à la préservation génétique des variétés anciennes.</p>	<p>La VdM havas naturajn riĉecojn kun tre interesa biodiverseco, kaj havas kolektojn de vegetaloj, kiuj plene partoprenas al la genetika savo de malnovaj varioj.</p>
<p>Un développement qui se veut durable doit concilier les exigences sociables, économiques et environnementales.</p>	<p>Iu disvolviĝo kiu celas longdaŭri devas akordigi la societemajn postulojn ekonomikajn kaj mediajn.</p>
<p>Notre collectivité l'a compris et met un point d'honneur à raisonner au présent pour préserver le futur et concilier progrès économique et social sans mettre en danger les équilibres naturels. Tel est notre engagement. Traduit par Christian Vacheron de la revue VdM</p>	<p>Nia kolektivumo tion komprenis kaj sin honoras pro sia nuntempa pripensado, cele la antaŭvidon de la estonteco kaj akordigi ekonomian kaj sociajn progreson sen endanĝerigi la naturajn ekvilibrojn. Tia estas nia promeso. Tradukis Christian Vacheron el gazeto VdM</p>

ESPERANTO - CALENDRIER DES EVENEMENTS	ESPERANTO ARANĜOJ - KALENDARO
<p>Peu d'organisateur connaît le service gratuit d'Eventoj du calendrier international des événements en espéranto, régulièrement tenu et publié depuis 1995 sur le net à : http://www.eventoj.hu</p> <p>Le calendrier liste les événements connus, congrès et rencontres, où sont invités des personnes extérieures au groupe des visiteurs.</p> <p>Cette liste indique seulement des éléments principaux: date, nom de l'arrangement, adresse du site, emblème, courriel et adresse des organisateurs.</p> <ul style="list-style-type: none"> - Si vous êtes organisateur de rencontres, enregistrez vos dates sur la liste du calendrier, cela sera une sérieuse réclame . Cette parution est gratuite. Les pages du calendrier international des événements espérantistes sont parmi les sites espérantistes les plus visités. - Si vous êtes un simple locuteur et utilisateur de l'espéranto, voyez la liste pour trouver la rencontre adéquate pour vos voyages de vacances. - Si vous êtes rédacteur d'un bulletin, ou guide d'une organisation, vous pouvez tirer des informations du calendrier international pour les membres de votre association ou de votre journal local. <p>Le calendrier est actualisé chaque semaine, donc toujours à jour.</p> <p>Pour ajouter ou compléter, allez sur : <kalendaro@eventoj.hu></p> <p>Le calendrier est consultable sur : http://www.eventoj.hu</p> <p>Nous vous remercions de bien vouloir faire connaître ce calendrier international, également dans vos pages internet. Szilvási László szilvasi heliko eventoj.hu</p> 	<p>Malmultaj organizantoj konas la senpagan servon ĉe Eventoj pri la Internacia Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj, regule kompilita kaj publikigita de 1995, kaj trovebla ĉe http://www.eventoj.hu</p> <p>La Kalendaro listigas ĉiujn konatajn E-renkontiĝojn, kongresojn, kaj kunvenojn, kie oni bonvenigas "eksterajn" partoprenantojn, vizitantojn.</p> <p>En la listo estas menciitaj nur la ĉefaj datenoj: dato, nomo de la aranĝo, retpaĝa adreso, emblemo, poŝta kaj reta adreso de organizantoj.</p> <ul style="list-style-type: none"> - Se vi estas organizanto de E-renkontiĝo, zorgu pri la listigo de via aranĝo en la Kalendaro, fakte tio signifas por vi seriozan reklamon. Aperigo de la informoj estas senpaga! La retpaĝo de Internacia Kalendaro estas unu el la plej vizitataj Esperantaj retejoj. - Se vi estas simple parolanto kaj uzanto de Esperanto, rigardu la liston por trovi taŭgan kaj allogan E-aranĝon por viaj feriaj vojaĝoj! - Se vi estas redaktoro de E-informilo, aŭ gvidanto de E-organizo, vi povas ĉerpi informojn el la Internacia Kalendaro por membroj de via asocio, aŭ por via loka gazeto. <p>La Internacia Kalendaro estas ĉiusemajne aktualigata, do ĝi estas daŭre aktuala!</p> <p>Aldonoj kaj kompletigoj estas atendataj ĉe: <kalendaro@eventoj.hu></p> <p>La Kalendaro estas trovebla ĉe: http://www.eventoj.hu -</p> <p>Ni estus dankaj, se vi helpus diskonigi la Internacian Kalendaron ankaŭ per mencioj en viaj ttt-paĝoj Szilvási László szilvasi heliko eventoj.hu</p> <p>(TROUVER LES DATES < DES CONGRÈS, (DES RENCONTRES INTERNATIONALES</p>

GRÂCE À L'ESPERANTO, LE FOOTBALL CHINOIS S'OUVRE AU MONDE

PER ESPERANTO, LA ĈINA FUTBALO MALFERMIĜAS AL LA MONDO

Le 11 juin, dans la ville de Fúzhōu, capitale de la province Fújiàn, a eu lieu n'inauguration officielle du nouveau club de football, C.D. Tortosa, en hommage à l'équipe catalane Club Sportiu Tortosa. C'est la 2e équipe chinoise du même nom, le premier club sportif fut créé à Canton (Guǎngzhōu) le 20 octobre dernier ; c'est le résultat des relations entre l'équipe catalane et la Chine – relations dans lesquelles, le rôle de l'espéranto est important-

En 2005, trois gamins de l'école des sports de Húběi –Hu Nan, Cai Wei kaj Huang He– devinrent footballeurs au C.D. Tortosa. Agés de 15 ans, ces joueurs pleins de promesses continuaient leurs études en Catalogne et chaque soir s'entraînaient au football. Le rêve de ces jeunes a été réalisé grâce à l'action de deux espérantistes actifs dans les deux pays Manel Vinyals et Hu Xu, qui s'étaient connus lors d'un voyage autour du monde du premier. Ils étaient aussi membres d'autres actions. Manel Vinyals est entrepreneur et Hu Xu membre de la ligue espérantiste du commerce de Fújiàn. Le cas a été plusieurs fois utilisé par des mouvements espérantistes catalan et chinois pour informer la presse.

Les relations entre C.D. Tortosa et la Chine se sont approfondies depuis 2005 et étendues à d'autres villes chinoises. Les dirigeants de la société de Football de Fújiàn pensent que le C.D. Tortosa apportera un football plus moderne et aidera le football régional, de même, l'équipe catalane augmente les effectifs de l'école : à Fújiàn 800 élèves s'entraînent à la nouvelle filiale de C.D. Tortosa. En même temps, l'utilité de l'espéranto est aussi publiquement reconnue. Lors de l'inauguration officielle, à Fújiàn, les plus hautes autorités politiques et sportives ont participé. Les médias ont traité l'événement comme une nouvelle importante, quelques footballeurs ont été interviewés à la télévision de Fújiàn. Ce programme spécial est passé trois fois par jour pendant cinq jours. Lors de l'inauguration, le mot espéranto figurait sur plusieurs affiches et a été utilisé pendant les solennités, c'est pour cela que les médias ont signalé, que «par l'espéranto le football de Fújiàn s'ouvre au monde».

[Ferriol Macip](#)

La 11an de junio, en la ĉina urbo Fuĝoŭo (Fúzhōu), ĉefurbo de la provinco Fuĝjano (Fújiàn), okazis la oficiala inaŭguro de nova futbal-klubo, C.D. Tortosa, omaĝe al la kataluna teamo Club Sportiu Tortosa. Temas pri la dua ĉina teamo kun tiu nomo, ĉar jam en Kantono (Guǎngzhōu) fondiĝis, la pasintan 20an de oktobro, samnoma sport-klubo, kiel rezulto de la interrilatoj de la kataluna teamo kun Ĉinio interrilatoj, en kiuj esperanto grave rolas.

En 2005, tri knaboj de la sportlernejo de Hubejo (Húběi) –Hu Nan, Cai Wei kaj Huang He– fariĝis futbalistoj en C.D. Tortosa. Temis pri tri 15-jaraj promesplenaj ludantoj, kiuj daŭrigis sian lernadon en Katalunio kaj ĉiuvespere trejniĝis pri futbalo. La revo de tiuj junuloj plenumiĝis dank'al la agado de du esperanto-aktivuloj en ambaŭ landoj –Manel Vinyals kaj Hu Xu–, kiuj interkonatiĝis dum la ĉirkaŭmonda vojaĝo de la unua en 2004. Ili ankaŭ estis parto de aliaj komunaj peresperantaj agadoj: Manel Vinyals estas entreprenisto kaj Hu Xu membras en la Fuĝjana Esperanta Komerca Ligo. La okazo estis jam plurfoje sukcese ekspluatita de la kataluna kaj ĉina esperanto-movadoj en sia informado al la gazetaro.

La futbal-rilatoj de C.D. Tortosa kun Ĉinio profundiĝis ekde 2005 kaj ampleksiĝis al aliaj ĉinaj urboj. La gvidantoj de la Futbal-Asocio de Fuĝoŭo opinias, ke C.D. Tortosa kunportos pli modernan futbalon kaj helpos la futbalon en la regiono, dum la kataluna teamo plinombrigas sian lernejon de lernantoj: en Fuĝoŭo 800 lernantoj trejniĝas en la nova filio de C.D. Tortosa. Samtempe la utileco de esperanto estas ankaŭ publike agnoskata. En la solena oficiala inaŭguro de la tria C.D. Tortosa, en la urbo Fuĝoŭo, partoprenis elstaraj aŭtoritatoj politikaj kaj sportaj. La provincaj amaskomunikiloj pritraktis la eventon kiel gravan novaĵon, kelkaj futbalistoj estis intervjuitaj de la televida programo de la televido de Fuĝoŭo, kiu elsendis specialan programon trifoje tage dum kvin tagoj. En la inaŭguro, esperanto aperis apud la ĉina en pluraj afiŝoj, kaj estis uzita dum la solenaĵo, tial amaskomunikilo informis, ke «per esperanto la futbalo de Fuĝjano malfermiĝas al la mondo».

[Ferriol Macip](#)